Angela Merkel parolis en sia videoalparolado rilate al Frankfurta Librofoiro pri la temo libroj. Ŝi emfazis la valoron de libroj kiel pliriĉiga elemento, kiu plivastigas la mensan horizonton. Malgraŭ la rapida preteco de mallongaj tekstoj en la interreto ŝi opinias la estontecon de la libro pozitiva. Por tio ŝi volas estigi resp. savi la politikajn antaŭkondiĉojn per la fiksado de libroprezoj kaj la reduktita aldonvalora imposto por libroj, kiuj estas laŭ la kancelierino baza bezono por la homoj same kiel nutraĵoj, sed ŝi ankaŭ intencas subteni pere de novaj leĝaj avantaĝoj por la libromerkato.

(deutschlandfunkkultur.de) (VDS-Infobrief)

Esperanto-movado en Kubo kreskas

En Kubo okazis pluraj movadaj, edukadaj kaj kulturaj aranĝoj. Kuba Esperanto-Asocio (KEA) partoprenis en jara evento, kiu okazas en Supera Pedagogia Instituto Enrique José Varona de Havano, kun la titolo „Por pli bona leciono“. KEA

estis prezentita ankaŭ ĉe la 6-a Metiejo Scienc-Metodologia pri Fremdaj Lingvoj, organizita de la Universitato de Oriente (Santiago de Cuba), en la Fakultato pri Edukado, Sociaj Sciencoj kaj Humanismaj Studoj. En Santa Clara sukcese okazis la forumo „Ludoviko Zamenhof: lia heredaĵo en la Esperanto-movado en Kubo“. En kelkaj urboj de la lando estis organizitaj aranĝoj, okaze de la Zamenhof-Jaro. Pri multaj aliaj aranĝoj, kiuj okazis en 2017, kaj plurajn informojn pri la lastatempa Esperanto-movado en Kubo oni povas legi en la senpage elŝutebla trimonata bulteno de Kuba Esperanto-Asocio: <https://goo.gl/YW3Z8>. (Revuo *Esperanto*, www.uea.org)

34-a Sanmarineca Universitato

SUS 34, la 34-a Sanmarineca Universitata Sesio de AIS San-Marino, okazis en la unua duono de septembro 2017 en la pola ĉefurbo Varsovio, laŭ invito de la administracia altlernejo *Warszawska Szkoła Zarządzania – Szkoła Wyższa (WSZ-SW)* en ties ejoj. Ĝi daŭris unu semajnon: Pliaj informoj ĉe <http://ais-sanmarino.org>. (Revuo *Esperanto*, www.uea.org)

Unu leciono pri Esperanto por ĉiu lernejo

Tiu ĉi agado, en kiu ILEI ludas centran rolon, estis prezentita en la revuo *Esperanto* de UEA, en la numero de julio-aŭgusto 2017. Mireille Grosjean preparis la labordokumentojn, kiujn ŝi jam uzis en sia instruista kariero. Ĉio aperas en la retejo de ILEI: <http://www.ilei.info/agado/projektoj.php>. Por prepari perfektajn dokumentojn en la franca lingvo, ŝi akiris la helpon de Kinglism Edeah el Benino. Nun la agado povas komenciĝi en ĉiuj franclingvaj ŝtatoj: Francio, Belgio, aliaj franclingvaj kantonoj de Svislando, Kanado kaj afrikaj landoj. Kiam pretos tradukado al plej multaj lokaj lingvoj, bonvolu liveri la dokumentojn en reta formo al ILEI, kiu prizorgos kompletan kolekton. Tia grandskala agado povus altiri intereson al nia lingvo. Por reagi al tia nova situacio, ILEI havas precizajn planojn. Oni povas malkovri ilin en la artikolo „La vento turniĝas“ en la oktobra numero de la revuo *Esperanto*.

(Les Brenets, Yahoo-grupo Landa Agado)

Malnovaj Esperanto-periodaĵoj legeblaj kaj traserĉeblaj en la reto

La kompletaj tekstoj de multaj jarkolektoj de pli ol 70 Esperanto-periodaĵoj, ekzemple tiuj de la revuo *Esperanto* de 1905 ĝis 1946, estas nun plene traserĉeblaj en la retejo de la Aŭstria Nacia Biblioteko. Bernhard Tuidler, estro de la kolekto en Esperanto-Muzeo en Vieno, respondas la demandojn de Libera Folio: <http://www.liberafolio.org/2017/10/02/historiaj-periodaĵoj-nun-rete-traserceblaj/>. La traserĉo eblas pere de la retejo ANNO (AustriaN Newspapers Online): <http://anno.onb.ac.at/anno-suche#searchMode=complex&from=1>

84-a Itala kongreso de Esperanto en Policoro

Loko de la kongreso estis la regiono Basilicata, la urbo Policoro, meze de la antikva Heraclea, regiono konata kiel „Granda Grekujo“ – „Magna Graecia“ ekde la 4-a jarcento a.K. Tiu regiono estis „lulilo“ de la nacia, respektive eŭropa civilizo meze de Mediteraneo. Dum la inaŭguro de la kongreso la prezidanto de la regiono Basilicata substrekis la grandan honoron por la regiono, ke tiel internacia E-kongreso povas okazi ĝuste ĉi tie. La prezidantino de la Itala E-Federacio s-ino Michela Lipari bonvenigis pli ol 200 partoprenantojn el Eŭropo kaj eĉ el Sudameriko, Kubo, Madagaskaro, Israelo kaj Mongolio. Tradicie dum italaj kongresoj okazas matene 2 seminarioj, ĉi-foje kun la temo pri kulturo kaj komunikado en Eŭropo (Osma Buller) kaj „De Informado kaj Konsciigo al Publikaj Rilatoj“ (Lu Wunsch-Rolshoven). Krome oni povis partopreni E-kursojn kaj konversacian kurson. Samtempe la gejunuloj havis propran programon kun multa muziko. Dum la kultura programo vespere elstaris la prezentado de la duo Kajto. Ankie kaj Nanne krome invitis al kantolaborgrupo. Esenca programo de tiu 1-semajna kongreso ĉiam estas duon-kaj tuttagaj ekskursoj al la historiĉa ĉirkaŭaĵo, ĉi-foje ĉefe la pitoreska regiono Basilicata kun siaj montoj kaj vilaĝoj, resp. urbetoj. Sub gvido de profesoro Carlo Minnaja marde posttagmeze kongresanoj estis gastoj en la Literatura Parko Carlo Levi, en Aliano, kie okazis dulingva debato pri literaturaj temoj. Dieter kaj Yoshie Kleemann, *Eŭropa Bulteno*, www.europa.eu/eoleuhropa-bulteno

Novaj trejnitaj instruistoj en Poznan

Kadre de Interlingvistikaj Studoj en Poznan en la tria jaro de la studoj oni povas specialiĝi pri kelkaj fakoj, inter ili ankaŭ pri metodologio de instruado de Esperanto. Por ke la grupo estu pli granda kaj el la instruado povu profiti pli da personoj, ILEI kaj edukado.net kunlaboras kun UAM (Universitato Adam Mickiewicz), kiu ebligas al la interesiĝantoj unujaran trejnadon. La programo konsistas el dufojaj unusemajnaj renkontiĝoj en Poznan kaj inter tiuj renkontiĝoj oni rete laboras, studas, solvas testojn kaj taskojn. La metodikan laboron gvidas Katalin Kováts, redaktoro de edukado.net, kaj pri la aldonaj studobjektoj la kursanoj partoprenas lekciojn kune kun la studentoj de Interlingvistikaj Studoj. Tia trejnado finiĝis en septembro kaj sukcese ekzameniĝis 5 personoj el 3 landoj. La finekzameno konsistis el prezento de modellecionoj kaj praktikaj klarigoj de gramatikaĵoj, kadre de la teoria ekzameno la kandidatoj ricevis demandojn pri literaturo, movadhistorio kaj gramatiko. Ĉiu devis pretigi ankaŭ studfinan laboraĵon: Krystina Worobiej el Pollando skribis pri Tabulludoj en la instruado de Esperanto, Marketa Wilkus pri aplikado de ludoj en la instruado, Jean-Claude Roy el Francio pri la temo E-o en lingvokafejoj kaj Mariusz Hebdzyński el Pollando pri E-o MMA aŭ konfronto de miksitaj lingvoartoj. El inter la studentoj de la 3-jaraj Interlingvistikaj Studoj Felix Jimenez Lobo el Hispanio verkis studojn kun la titolo „Analizo de kvar lernolibroj de Esperanto por hispanlingvanoj“. La nova grupo de Interlingvistikaj Studoj

startis en la sama semajno kun 21 personoj, kun pluraj eĉ el Azio.

(Katalin Kovacs, *Eŭropa Bulteno*, www.europa.eu/eoleuhropa-bulteno)

Ĉu Eŭropo vere ĉesas ami la anglan?

Jean-Claude Juncker asertis, ke la angla perdas sian gravecon en Eŭropo. – „Ĉu li pravas?“, demandas Chris Harris kaj argumentas: „Malrapide sed certe la angla perdas gravecon en Eŭropo,“ la ĉefo de EU, Jean-Claude Juncker, diris pasintjare. Iuj povus vidi liajn komentojn kiel provon akiri la superecon en la intertraktadoj de Briteliro. Aliaj povus aserti, ke li pravas, kiam Britio fine forlasos Eŭropan Union nur Malto kaj Irlando havos la anglan kiel unu el siaj oficialaj lingvoj. La statistikoj tamen pentras alian bildon. Ciferoj publikigitaj por Eŭropa Tago de Lingvoj malkaŝas, ke 83.5% de EU-bazlernejoj lernadis la lingvon de Ŝekspiro en 2015, la plej lasta periodo, por kiu datumoj haveblas. La angla eĉ fariĝis pli populara. La proporcio de junuloj kiuj lernas la lingvon pligrandiĝis je 6% en la du jaroj antaŭ 2015. Sed la britelira referendumo okazis junio 2016. Procentoj de elementlernejoj, kiuj lernas la anglan: (2015) Svedio 87,9; Finnlando 68,6; Estonio 77,1; Latvio 87,8; Litovio 73,3; Pollando 97,6; Germanio 72,7; Nederlando 42,9; Belgio 36,7; Luksemburgo 100; Aŭstrio 100; Ĉeĥio 73,6; Slovakio 85,9; Rumanio 98,3; Hungario 59,6; Bulgario 82,9; Francio 99,2; Slovenio 49,8; Kroatio 99,9; Italio 98,6; Portugalio 35,4; Hispanio 99,4; Grekio 79,4.

(Chris Harris, tradukis Seán Ó Riain, *Eŭropa Bulteno*, www.europa.eu/eoleuhropa-bulteno)

Biblioteka apogo Bachrich subvencias 8 bibliotekojn

La Fondaĵo „Biblioteka Apogo Honore al la Geedzoj Maria kaj Johano Bachrich“, kies celo estas subteni kaj pliriĉigi la kolektojn de Esperanto-bibliotekoj, asignis subvenciojn, uzeblajn por akiri librojn aŭ aliajn varojn, aĉeteblajn ĉe la Libroservo de UEA – al 8 el la 12, kies petoj estis ricevitaj okaze de la ĉi-jara alvoko. La subvencioj ĉi-jare estis: Kolombia Esperanto-Ligo (231,05 €), Berlina Esperanto-Ligo (123,92 €), Slovakia Esperanto-Federacio (164,93 €), Brazila Esperanto-Ligo (224 €), Kuba Esperanto-Asocio (327,05 €), Asocio Solidareca Bonvolo (Kongo, DR, 61,00 €), Demokrata Kongolanda Esperanto-Asocio (235,95 €), Triesta Esperanto-Asocio (Italio, 133,78 €). Ankaŭ ĉi-jare UEA ricevis konsiderindan kvanton da tre kvalitaj subvencioj el diversaj mondopartoj, kun signifa kresko de la nombro da petoj el Afriko – komentas Sara Spanò, Estrarano de UEA pri Kulturo – elekti la subvenciojn estis tre malfacila tasko. Biblioteka Apogo Bachrich, starigita de UEA en 2014 danke al la donaco de la gefiloj de gesinjoroj Bachrich (Venezuelo), alfrontas unu el la plej senteblaj kulturaj bezonoj de la E-movado, subtenante bibliotekojn, kiuj ne ricevas financan subtenon de ŝtata, urba aŭ alia nemovada instanco, kaj kiuj tial riskus ne havi sufiĉe da rimedoj por adekvate pligrandigi siajn kolektojn.

(Gazetaraj Komunikoj de UEA, www.uea.org)

Premio al Itala Esperanto-Federacio

Itala Esperanto-Federacio ricevis la premion „Itala premio pro homaj rajtoj 2017“ fare de asocio de liberaj ĵurnalistoj kaj de la itala Sekcio de Amnesty International. La premio, konsistanta el diplomo kaj pentraĵo, estis transdonita al la prezidantino de IEF Michela Lipari, dum ceremonio en Romo. La motivigo de la premio parolas pri la agado de IEF en la kampoj de interkompreniĝo inter popoloj laŭ la idealoj de Esperanto, de helpo al viktimoj de militoj kaj katastrofoj en la mondo, de partopreno en la agado Oriento-Okcidento de Unesko por diskonigi la literaturajn ĉefverkojn de la diversaj kulturoj eksterlanden; el la itala estis tradukitaj al Esperanto verkoj kiaj *Dia Komedio* de Dante, *La Princo de Machiavelli*, *La Malemuloj* de Verga, *La Gefianĉoj* de Manzoni, *Homa vivo* de Ungaretti, *Kantoj* de Leopardi, *Myricae* de Pascoli, kaj ankoraŭ aliaj.

(Renato Corsetti)

Oficejoj de UEA en Afriko

Sekve de la malferma alvoko, kiun UEA lanĉis en gazetaraj komunikoj N-ro 662 por tiuj esperantistoj loĝantaj en Afriko, kiuj interesiĝas plenumi parton aŭ ĉiujn el la taskoj de la Afrika Oficejo, venis 9 kandidatiĝoj ĝis la limdato. Post detala trarigardo de la kandidatiĝoj kaj konsideroj rilate al la buĝetaj limigoj, elektitaj kandidatoj estis intervjuitaj. Plurflankaj interkonsentoj kaj interparoloj pri eblaj disdividoj de la rimedoj gvidis al la decido malfondi la Afrikan Oficejon kaj starigi oficejojn de UEA en Lomeo (Togolando) kaj Lokossa (Benino), kaj sekve de tio uzi por ili la nomojn Lokossa Oficejo de UEA kaj Lomea Oficejo de UEA. En tiuj du oficejoj laboros Apélété Agbolo kaj Adjévi Adjé (Lomea Oficejo) kaj Bernard Gnancadja (Lokossa Oficejo). Ili ne nur plenumos taskojn rilate al la Afrika agado, sed ankaŭ rilate al la ĝeneralaj agadoj de UEA. Pli da informoj pri la afrika movado haveblas per: www.esperanto-afriko.org (Bulteno *Esperanto en Afriko*)

Internacia Kalendaro

La „Internacia Kalendaro“ listigas ĉiujn konatajn Esperanto-renkontiĝojn, kongresojn, festivalojn, kiuj akceptas vojaĝantajn esperantistojn kiel partoprenantojn. Se mankas iu aranĝo, oni povas anonci kaj registri ĝin senpage. La Internacian Kalendaron funkciigas teamo de la Esperanto-Centro „Evento“ en Budapeŝto ekde 1996, kaj enhavas ĉiujare ĉ. 250 Esperanto-aranĝojn. Adreso de la Internacia Esperanto-Kalendaro: <http://www.eventoj.hu/kalendaro.htm>. Se vi ŝatus esti kunlabora membro en nia teamo, kontaktu nin: Szilvási László, szilvasi@eventoj.hu

(Ret-Info / Lingvo-Studio, LS, <http://www.eventoj.hu>)

Nova libro por Zamenhofa Jaro

Por la Zamenhofa Jaro s-ro Song Yunsheng, konata verkisto, tradukisto kaj eksa vicprezidanto de LEA (Liaoning-provinca Esperanto-Asocio, Ĉinio), finverkis la 99-paĝan libron „La kreinto de Esperanto kaj Homaranismo D-ro Zamenhof kaj Lia familio“ post sesmonata laboro. Ĝi detale prezentas

D-ron Zamenhof kaj lian familion, inkluzive de la kreinto de Esperanto mem, kaj liaj gepatroj, edzino, filo kaj bofilino, filinoj, junaj fratoj, junaj fratinoj kaj nepo. Tiu ĉi ĉinlingva libro (148mm x 210mm) estis eldonita de Eldonejo de Liaoning-a Universitato en septembro 2017 kaj presita en oktobro 2017.

(Wu Guojiang, ghemelurboj@sina.cn, Yahoo-grupo uea-membroj)

Reprezentanto de UEA alparolis plenan sesion de la 39-a Ĝenerala Konferenco de Unesko

La 6-an de novembro 2017 reprezentanto de UEA faris 3-minutan paroladon antaŭ dumilo da diplomatoj, aktivuloj kaj oficistoj el la tuta mondo, en la plena sesio de la 39-a Ĝenerala Konferenco de Unesko, okazanta ĉe la sidejo de Unesko en Parizo. Nur dudeko da internaciaj neregistaraj organizaĵoj (NRO-oj) ricevis tian lokon en la tagordo.

La voĉo kaj la vizaĝo de UEA estis tiuj de Rakoen Maertens, juna aktivulo el Belgio kaj komisiito de TEJO pri agado ĉe Unesko, kiu jam akiris spertojn pri eksteraj rilatoj en pluraj internaciaj aranĝoj inkluzive, de NRO-Forumo de Unesko, okazinta pasintmaje en Riado, Sauda Arabio. Subtenanta lin estis teamo konsistanta el René Triolle, François Lo Jacomo, Barbara Despiny, Didier Loison kaj Gilles Tabard. Dum sia interveno Maertens emfazis la kernan gravecon de komunikado en la laboro de Unesko. Laŭ li, interkompreniĝo, trovo de komunaj intereso, partneriĝo kaj kunlaboro ja estas la bazo de la agado. Tamen, en internaciaj medioj, „komunikado ne ĉiam estas, kia ĝi ŝajnas esti. Estas baroj.“ Inter tiuj baroj li substrekis „malegalecon en memesprimado, ĉar difinita lingvo povas esti ne agnoskata, dum aliaj jes. Uzi specifan lingvon, apartenantan al specifa kulturo, kreas malegalecon en la komunikado.“ Emfazante ĝian longan kunlaboron kun Unesko, Maertens elstarigis la aktivan engaĝiĝon de UEA por „profunda komunikado, lingva kaj kultura egaleco, lingva diverseco kaj interkultura interŝanĝo.“ Li kaptis la okazon ankaŭ por menciigi la 100-an datrevenon de la forpaso de Zamenhof, solenatan sub aŭspicio de Unesko, kaj la lastatempan aperigon de la Unesko-Kuriero en Esperanto, kies ekzempleron li montris dum la parolado. La parolado finiĝis per inspiraj vortoj kaj bondeziroj por „profunda, signifoplena kaj konstruema dialogo, en malferma interkompreniĝemo“. Maertens krome invitis la ĉeestantojn al solena aranĝo ene de la Unesko-konstruaĵo la 11-an de decembro, organizata de la Unesko-teamo de UEA kunlabore kun la pola Unesko-delegacio, por oficiale fermi la Zamenhof-Jaron. Video: http://lesperanto.china.org.cn/2017-11/10/content_50057117.htm

(Gazetaraj Komunikoj de UEA, www.uea.org)

Scratch – programista platformo (ne nur) por infanoj

Ĉu programado povas esti amuza kaj alloga eĉ por infanoj? Fakte jes, krome, eblas lerni ĝin eĉ en Esperanto. Pluraj talentitaj homoj de la fama Masaĉuseca Instituto de Teknologio

(MIT) demandis sin: „Kiel per amuza kaj luda formo instrui al infanoj (kaj ne nepre nur al ili, samo funkcios al plenkreskuloj) programadon?“ Sekve ekestis la projekto „Scratch“, kiu volas plenumi ĝuste tion – ludeme instrui al homoj bazojn de programado, faciligi la procezon kaj vekti kreemon ĉe la uzantoj. La reta platformo nuntempe funkcias jam en pli ol 80 lingvoj, inkluzive de Esperanto. Per la programo eblas krei diversajn kaj diversspecajn aferojn – poŝtkartojn, komputilajn ludojn, videetojn, animaĵojn, kvizojn, kursojn ktp. Certe indus ankaŭ helpi fintraduki la retejon al Esperanto, temas pri ege utila projekto por nia movado. La retejo de Scratch estas: <https://scratch.mit.edu>; elekti/ŝanĝi lingvon oni povas sube en la retejo.

Ankaŭ tiun ĉi retejon prezentis E@I la 20-an de oktobro al lernantoj en Partizánske (sidejo de E@I en Slovakio) okaze de la tuteŭropa aktivado „Meet and Code“ (Ni renkontiĝu por programi), kiu okazas dum la „Eŭropa semajno de programado“.

Ĉi tiu iniciato celas pretigi infanojn kaj gejunulojn por la bezonoj de cifereca mondo de la estonteco, subtenante ĉiujn formojn de programado. E@I pretigis du programerojn. La slovak esperantisto kaj profesia programisto Viliam Búr prezentis al lernantoj kaj studentoj en Partizánske sian profesion. Unue en gimnazio li parolis pri la nuna stato en la programista profesio, pri la programlingvoj, pri laboro, avantaĝoj kaj malavantaĝoj de tiu ĉi nuntempe ege bezonata profesio. Poste li kune kun Peter Baláž prezentis „Scratch“-on al infanoj de bazlernejo en la urbo. Dum du horoj ili vere kaptiĝis kaj kapablis fari bazajn komputilajn ludojn.

(Peter Baláž, E@I-kunordiganto,
La Ondo de Esperanto,
<http://esperanto-ondo.ru/Aktualaj/>)

UEA investis 10.000 eŭrojn en Amikumu, kiu ricevis premion de LangFest

Amikumu estas poŝtelefona apo (programo), per kiu oni povas trovi samlingvanojn, kiuj troviĝas proksime. Ĝi estis lanĉita por esperantistoj en aprilo 2017 kaj rapide iĝis tre populara. Ĝus aperis nova versio, kiu interalie signifas, ke ne nur eblos serĉi parolantojn de multaj lingvoj, sed ankaŭ la programo mem iĝas multlingva: La apo nun estas havebla en pli ol 20 lingvoj cele al la lanĉoj por tri grandaj prilingvaj eventoj el la tuta mondo. Amikumu oficiale sponsoras la eventojn Polyglot Conference en Islando kaj Poliglotar en Brazilo, kaj oni ankaŭ havos budon ĉe la „2017 Deaf Festival“ en Sidnejo. Do, ĉi tiu ĝisdatigo preparas nin por tiuj gravaj eventoj, rakontas Richard Delamore, ĉefa afergvida oficisto de Amikumu. Grave estas, ke post la ĉiulingva lanĉo oni nun povas verki profilon en ĉiu lingvo, kiun oni scipovas, kio estas unikaĵo nur al Amikumu. Aktuale Amikumu havas iom pli ol 7.500 uzantojn, el kiuj 6.000 indikis, ke ili regas Esperanton. La parolantoj de la angla estis iom malpli multaj. Sur la sekvaj lokoj en la lingva statistiko de Amikumu estas la hispana, franca, germana, portugala kaj itala.

La uzantaro konstante kreskas je 20 ĝis 30 uzantoj tage, sed la publika lanĉo de Amikumu en pluraj eventoj laŭ Richard Delamore certe rezultigos videblan salton en la statistiko,

kaj interalie forpuŝos Esperanton el la pozicio de la plej parolata lingvo inter Amikumanoj. Amikumu antaŭ kelkaj semajnoj estis konigita ankaŭ en la lingvoevento LangFest en Montrealo, kie la apo ricevis premion. LangFest estas la plej granda evento por lingvemuloj en Nordameriko kaj donis 3 premiojn. Nia premio estis la premio por novigo (Innovation Award). Por ebligi la evoluigon de la apo, Amikumu serĉis kaj trovis investantojn, kiuj aĉetis akciojn en la firmao. Entute estis kolektitaj pli ol 98.000 eŭroj de 15 investantoj, el kiuj 10.000 venas el la kaso de UEA, rakontas Richard Delamore.

(<http://www.liberafolio.org>)

CDELI festis 60-jariĝon

La 30-an de septembro kaj 1-an de oktobro 2017 okazis solenaĵo pro la 60-jariĝo de CDELI (Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia). Stefano Keller rakontis pri la historio kaj nuna stato de la biblioteko, kaj ties mondsignifa rolo. D-rino Zorana Sokolovska el Universitato de Friburgo studis en la biblioteko, esplorante ĉiujn dokumentojn pri la Esperanto-movado en Svislando. Lernantoj de la „Granda Ursino“ prezentis spektaklon kun la temo: Biblioteko. Claude Gacond rakontis pri la pozitiva efiko de Esperanto-instruado. Posttagmeze Tomas Chmielik, studinte en CDELI dum tridek jaroj la artikolojn de Edmond Privat, rakontis pri la verkaro de la eminentulo. Junulo Cesco (Ĉesko) Reale informis pri la poliglotaj kunvenoj, kaj knabo Luc (Luk) Allemand amuze skeĉis pri la „literatura“ Esperanto-alfabeto. La vespero konkludiĝis per kanta recitalo de S-ino Elisabeth de Mestral en konservatorio de La-Chaux-de-Fonds. La Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia en La Chaux-de-Fonds, Svislando, estis fondita en 1967. Ĝi estas fako de la Urba Biblioteko kaj enhavas pli ol 20.000 bibliografiajn unuojn. Interlingvistike neŭtrala (tial la nomo en la franca), CDELI ne entenas nur esperantaĵojn, sed celas konservi dokumentojn en ĉiuj planlingvoj: tie situas la plej riĉaj bibliotekoj en Volapuko kaj en Okcidentalo, interalie. Ĝi estas unu el la Interlingvistikaj instancoj de Esperantujo.

(Dieter Rooke, <http://www.espero.com.cn>)

(Kolektis kaj prilaboris Uwe Stecher)



Esperanto inter la plej gravaj kulturaj eventoj de Vroclavo kaj Malsupra Silezio

La 23-an de februaro 2017 la tiutempa koordinisto de Malsuprasilezia Festivalo de Scienco (MFS) en Pollando, prof. dr. hab. Tadeusz Dobosz, sendis al Eŭropa Centro de Interkultura Edukado invitleteron, proponante prezentadon de Esperanto kadre de tiu festivalo.

Malsuprasilezia Festivalo de Scienco (MFS) daŭras jam 20 jarojn kaj estas unu el la plej gravaj kulturaj eventoj de Vroclavo kaj la tuta regiono de Malsupra Silezio. Dum MFS okazas pli ol 1500 programoj, kiuj estas direktataj al pli ol 140.000 adresatoj. La festivalon akompanas bele eldonita broŝuro kun tuta programo kaj revuo, en kiu estas priskribitaj la plej gravaj eventoj – kaj inter ili troviĝas dupaĝa artikolo de Małgosia Komarnicka „Fenomeno de Esperanto”.

Ĉi-jare la organizantoj de MFS speciale kreis panelon „Esperanto, la lingvo sen limoj”, kadre kiu okazis kvin programoj, kiuj popularigis kaj proksimigis la lingvon Esperanto, montrante eblecojn, kiujn donas esperantisteco. Ĉiuj programoj okazis en la salonoj de Vroclava Universitato kaj elvokis interesigon de lernantoj, plenkreskuloj kaj pliaĝuloj.

Por ni, esperantistoj, kaj organizantoj de Esperanto-programoj, partopreno en MFS estis tempo de penega kaj streĉa laboro, kiu finiĝis per kontenteco kaj atingo de difinita celo. Ĝojo, rideto, interesigo de partoprenantoj de niaj programoj estis por ni la plej bela premio.

Kadre de la ĉi-jara jubilea Malsuprasilezia Festivalo de Scienco, Eŭropa Centro de Interkultura Edukado preparis kaj prezentis 5 programojn, de vendredo la 22-an, ĝis mardo la 26-an de septembro 2017:

► **„Esperanto – de malgranda lernolibro ĝis tutmonda movado”** – Małgosia Komarnicka prezentis historion de la lingvo Esperanto kaj de la Esperanto-movado kaj etlecionon, montrante profitojn, kiujn donas esperantisteco. Tuj post la prelego kreiĝis nova Esperanto-kurso.

► **„Esperanto – malmutekosta vojaĝado”** – Magdalena Tatara kaj Roberto Kamiński pruvis, ke oni povas viziti la mondon malmultekoste aŭ preskaŭ senpage, danke al Esperanto. Aplaudon elvokis konkurso kun premioj, per kiu estis finita la prelego.

► **„Esperanto – literaturo kaj poezio”** – Lidia Lięża surprizis la partoprenantojn de sia prelego, konsciigante al ili, ke multaj tutmondaj skribverkoj estis konataj danke al Esperantaj tradukoj. Respondante demandojn de la publiko interalie ŝi interese priskribis sian laboron kiel E-tradukistino, pruvante, ke Esperanto scipovas transdoni ĉiaspecajn nuancojn de la homa pensado.

► **„Esperanto – en verdaĵo kaj arto”** – la vroclava artistino Elżbieta Wodała kune kun Małgosia Komarnicka preparis programon, en kiu la lernantoj memstare kreis bildojn el elementoj de sekigitaj plantoj, ekkonante



Esperantaj nomojn de la plantoj kaj samtempe historion de Esperanto. Fine de la programo la lernantoj tuj aprobis la proponon de sia instruistino, ke ili kolektu kiel eble plej multe da informoj pri Esperanto kaj prezentu ilin interese dum la leciono.

► **„Esperanto – verdaj strofetoj”** – Halina Kuropatnicka-Salamon bele kunligis poezion kaj muzikon. La muziko pliigis la eksterordinaran etoson, kiun kreis ĉarmaj versaĵoj, deklamataj pole kaj Esperante de la poetino. Granda surprizo estis demonstrado, kiumaniere oni skribas kaj legas per brajlo ankaŭ en la lingvo Esperanto.

La estraro de Eŭropa Centro de Interkultura Edukado ege dankas al niaj amikoj, kiuj helpis al ni prezenti programojn pri Esperanto dum la Malsuprasilezia Festivalo de Scienco, komprenante, ke ĉi tiuj agoj estas investado en estontecon de Esperanto. Jam la 23-an de oktobro komenciĝos novaj Esperanto-kursoj.

Oni devas substreki, ke ni ĉiuj laboris senpage, aĉetante propramone bezonatajn helpilojn, pagante ankaŭ veturkaj restadkostojn. Tiuj elspezoj ne permesis al ni promocii Esperanton en aliaj urboj de Malsupra Silezio, kie ankaŭ okazis programoj kadre de Malsuprasilezia Festivalo de Scienco.

Eŭropa Centro de Interkultura Edukado jam estis invitita por prepari programojn pri Esperanto kadre de la venontjara festivalo. Ni do jam petas helpon de esperantistoj el la tuta mondo por profesie kaj interese prezenti Esperanton en neesperantista medio. Tio estas escepta ŝanco por Esperanto montri ĝian modernan bildon kaj utilecon. Kontaktigu kun ni pere de la retroŝto: informado.eo@gmail.com, aldonante la titolon: MFS.

En la nomo de Eŭropa Centro de Interkultura Edukado
Małgosia Komarnicka



Medienecho

Ich bedanke mich herzlich für zugesandte Artikel und Hinweise. Bitte geben Sie bei Mitteilungen einen eindeutig identifizierbaren Absender und einen sinnvollen Betreff an, damit sie nicht im Spam-Ordner landen.

Netzbeiträge, die nur über Angabe persönlicher Daten, per Passwort, kostenpflichtig oder nach Anmeldung zu lesen sind, werden in dieser Zusammenstellung nicht berücksichtigt.

Auf nicht im Netz erschienene Berichte, die mir aber selber vorliegen, wird hingewiesen. Diese sende ich Interessenten gerne als Kopie zum persönlichen Gebrauch (nur per Netzpost) zu. Anfragen an „medienecho@esperanto.de“ - Bitte den jeweils genannten Betreff angeben.

9. November 2017

NDZ.de

La Ratkaptista Bando
HESSISCH OLDENDORF. Vor 30 Jahren hat im Gemeindehaus Fuhlen ein Esperanto-Kurswochenende stattgefunden. Die Teilnehmer waren begeistert und beschlossen, sich weiterhin zu treffen, um die internationale Plansprache zu erlernen.
http://www.ndz.de/startseite_artikel,-la-ratkaptista-bando-arid,2415603.html

8. November 2017

Zeitsprung

Die Anfänge des Esperanto

ca. einstündige Sendung
<http://www.mmv-mediathek.de/play/22779-esperanto-welle.html>

5. November 2017

Radio Erfurt International

Wir springen in die zweite Hälfte des 19. Jahrhunderts und beschäftigen uns mit Plansprachen. Vor allem geht es um die Anfänge des Esperanto und wie die Sprache die ersten Reformkrisen überstand: Ludoviko Lazaro Zamenhof, der Initiator der Sprache, stellte bereits wenige Jahre nach Veröffentlichung von Esperanto Reformen zur Abstimmung.
<https://player.fm/series/zeitsprung-1251699/zs11-die-anfange-des-esperanto>

8. November 2017

Erbach-Channel

Neue Stammesführung gewählt
Das Bundeslager „Estonteco“ des Dachverbands der Silberreier war ein Höhepunkt für die Pfadis. „Estonteco“ bedeutet Zukunft.
http://www.ebch.info/art_ausgabe.php?id=37155

6. November 2017

DEWEZET

„La Ratkaptista Bando“: Esperanto-Gruppe feiert Jubiläum

HAMELN. 30 Jahre sind vergangen, dass im Gemeindehaus Fuhlen ein Esperanto-Kurswochenende stattfand. Die Teilnehmer waren begeistert und beschlossen, sich auch weiterhin zu treffen, um die internationale Plansprache zu lernen. So wurde bald die Esperanto-Gruppe Hessisch Oldendorf gegründet. Nach mehreren Sprachkursen kamen auch Mitglieder aus anderen Orten des Kreisgebietes dazu, man verlegte den Treffpunkt in die Mitte des Landkreises und änderte den Namen in Esperanto-Gruppe Hameln.
https://www.dewezet.de/region/hameln_artikel,-la-ratkaptista-bando-esperantogruppe-feiert-jubilaem-arid,2415344.html

5. November 2017

Freier Rundfunk Erfurt international

Einstündige Sendung
http://www.radio-frei.de/?iid=1&ksubmit_show=sendung&kunixtime=1509908400

2. November 2017

Radio China International

CRI veranstaltet Preisverleihung von 2. Internationalen CRI-Kurzfilmwettbewerb

Der stellvertretende Chefredakteur von Radio China International (CRI), Ren Qian, der Vorsitzende des Esperanto-Weltbundes, Mark Fettes, und Vertreter der Preisträger nahmen am Freitag an der Preisverleihung des Zweiten Internationalen CRI-Kurzfilmwettbewerbs in Dushan teil. Die Verleihungszeremonie begann mit einem Lied auf Esperanto von einer Band aus Litauen.
<http://german.cri.cn/3105/2017/11/02/1s271125.htm>

2. November 2017

**Medienanstalt Mecklenburg-Vorpommern
Mediathek, Esperantowelle**

ca. einstündige Sendung
<http://www.mmv-mediathek.de/play/23276-esperanto-welle.html>

24. Oktober 2017

Zitty.de

Flughafen Tempelhof - Gemischte Gefühle

... zusammen mit der Vereinnahmung der Blume durch Ideologen und ihrer Verwendung als Symbol für die langsam der Vergessenheit anheimfallende Esperanto-Bewegung.
mit Kommentar-Funktion
<https://www.zitty.de/gemischte-gefuehle-tempelhof/>

23. Oktober 2017

Radio Dreyeckland

Esperantomagazin

mit einer informativen Esperanto-Unterrichtsstunde
<https://player.fm/series/radio-dreyeckland-180765/esperantomagazin039-montag-23102017>

20. Oktober 2017

Pressreader

Proletarier aller Länder, verständigt euch

Der Arbeiterdichter Hans Weinhengst schrieb in Esperanto. Turmstraße 4/Turstrado 4. Jetzt ist sein Roman von Christian Cimpa übersetzt worden.

<https://www.pressreader.com/austria/salzbürger-nachrichten/20171020/281633895475667>

18. Oktober 2017

**Medienanstalt Mecklenburg-Vorpommern
Mediathek, Esperantowelle**

ca. einstündige Sendung

<http://www.mmv-mediathek.de/play/22987-esperanto-welle.html>

12. Oktober 2017

eprevodilac.com

Ein Deutsch-Esperanto-Onlineübersetzer mit Wörterbuch

Das Programm leistet erstaunlich gute Ergebnisse.

<https://de.eprevodilac.com/prevodilac-nemacki-esperanto>

10. Oktober 2017

HarzKurier

Vorbereitung für Jugendfreizeit

Herzberg - Ein deutsch-polnisches

Städtepartnerschaftsseminar fand im Esperanto-Zentrum statt.

Eine Kopie des Textes zum persönlichen Gebrauch sende ich

auf Wunsch gerne per Netzpost zu: „medienecho@esperanto.

de“, Betreff: „2017_10_11_harzkurier“

<http://www.harzkurier.de/lokales/herzberg/article212193235/>

[Vorbereitung-fuer-Jugendfreizeit.html](http://www.harzkurier.de/lokales/herzberg/article212193235/Vorbereitung-fuer-Jugendfreizeit.html)

8. Oktober 2017

steemit

Warum nicht mit der Bibel Esperanto lernen?

ca. einstündige Sendung

En la komenco Dio kreis la ĉielon kaj la teron.

Im Anfang schuf Gott die Himmel und die Erde.

[https://steemit.com/deutsch/@wuhotan/lerne-esperanto-mit-](https://steemit.com/deutsch/@wuhotan/lerne-esperanto-mit-der-bibel-1-mose-1)

[der-bibel-1-mose-1](https://steemit.com/deutsch/@wuhotan/lerne-esperanto-mit-der-bibel-1-mose-1)

6. Oktober 2017

HarzKurier

Über Redewendungen in Esperanto

Herzberg - Leipziger Sprachwissenschaftlerin war zu Gast in Herzberg

Eine Kopie des Textes zum persönlichen Gebrauch sende ich

auf Wunsch gerne per Netzpost zu: „medienecho@esperanto.

de“, Betreff: „2017_10_06_harzkurier“

<http://www.harzkurier.de/lokales/herzberg/article212145729/>

[Ueber-Redewendungen-in-Esperanto.html](http://www.harzkurier.de/lokales/herzberg/article212145729/Ueber-Redewendungen-in-Esperanto.html)

6. Oktober 2017

Herzberg am Harz

Esperanto-Sprachwissenschaftlerin in Herzberg

Auf Einladung des Esperanto-Zentrums in Herzberg hielt

die Leipziger Sprachwissenschaftlerin Sabine Fiedler in der

Stadtbücherei Herzberg einen Vortrag über Redewendungen,

Zitate, usw., die in der Sprache Esperanto üblich sind

<http://herzberg.de/magazin/artikel.php?artikel=4028&type=2>

[&menuid=377&topmenu=7](http://herzberg.de/magazin/artikel.php?artikel=4028&type=2)

5. Oktober 2017

Medienanstalt Mecklenburg-Vorpommern

Mediathek, Esperantowelle

ca. einstündige Sendung

<http://www.mmv-mediathek.de/play/22986-esperanto-welle.html>

1. Oktober 2017

Freier Rundfunk Erfurt International

ca. einstündige Sendung

Einstündige Sendung

http://www.radio-frei.de/?iid=1&submit_show=sendung&unixtime=1506880800

27. September 2017

HarzKurier

Michaela Stegmaier berichtet über Togo-Reise

Herzberg - Die Vorsitzende der Deutschen Esperanto-

Jugend, Michaela Stegmaier, berichtete im Herzberger

Esperanto-Klub über ihre zweiwöchige Reise nach Togo. Ein

internationaler Esperanto-Jugendkongress mit Teilnehmern

aus 26 Ländern fand Anfang August in der Stadt Aneho statt.

Eine Kopie des Textes zum persönlichen Gebrauch sende ich

auf Wunsch gerne per Netzpost zu: „medienecho@esperanto.

de“, Betreff: „2017_10_27_harzkurier“

<http://www.harzkurier.de/lokales/herzberg/article212067691/>

[Michaela-Stegmaier-berichtet-ueber-Togo-Reise.html](http://www.harzkurier.de/lokales/herzberg/article212067691/Michaela-Stegmaier-berichtet-ueber-Togo-Reise.html)

26. September 2017

Südkurier

VHS im Landkreis Konstanz startet ins neue Semester

An der VHS-Sprachenschule in Konstanz werden 23 Sprachen

unterrichtet, unter anderem Niederländisch, Polnisch, Arabisch,

Japanisch, Chinesisch, Indonesisch, Farsi, Griechisch und

Norwegisch. Dazu auch selten angebotene Sprachen wie

Esperanto, Swahili, Ungarisch und Rumänisch.

<https://www.suedkurier.de/region/kreis-konstanz/>

[konstanz/VHS-im-Landkreis-Konstanz-startet-ins-neue-](https://www.suedkurier.de/region/kreis-konstanz/konstanz/VHS-im-Landkreis-Konstanz-startet-ins-neue-Semester;art372448,9429662)

[Semester;art372448,9429662](https://www.suedkurier.de/region/kreis-konstanz/konstanz/VHS-im-Landkreis-Konstanz-startet-ins-neue-Semester;art372448,9429662)

26. September 2017

Kölnische Rundschau

Mit Reggae nach Togo - Musiker Jonny M. war beim

Treffen der Esperanto-Jugend

Als der Stammesfürst aus Togo auf der Veranda seines Hauses

den Reggae-Sänger Jonny M. aus Bergisch Gladbach empfing,

trafen zwei Exoten aufeinander: Krone, Zepter und weiße Robe

auf der einen Seite, Sweatshirt, Rucksack und Rastalocken auf

der anderen. Für Jonny M., mit bürgerlichem Namen Jonas

Marx, waren Smalltalk und Shakehands mit dem afrikanischen

Oberhaupt Teil einer ungewöhnlichen Reise. Als Künstler, der

sich für die Verbreitung der Kunstsprache Esperanto engagiert,

war der 27-Jährige Gast des internationalen Treffens der

Esperanto-Jugend in Afrika. „Esperanto ist ja nicht nur eine

Sprache, sondern auch Ideologie und Kultur.“

Eine Kopie des Textes zum persönlichen Gebrauch sende ich

auf Wunsch gerne per Netzpost zu: „medienecho@esperanto.

de“, Betreff: „Jonny M. 2017_09_26“

25. September 2017

Dill-Post

Europäischer Tag der Sprachen am 26. September 2017

Die internationale Sprache Esperanto respektiert und unterstützt die sprachliche und kulturelle Vielfalt in der ganzen Welt. Hinter Esperanto steht kein Staat, kein Wirtschaftssystem oder imperialistische Bestrebungen. Hinter Esperanto stehen nur Menschen, die Gerechtigkeit für alle Kulturen und alle Sprachen in Frieden unter den Völkern suchen.

https://www.mittelhessen.de/lokales/region-dillenburg/leserreporter-region-dillenburg_artikel,-Europaischer-Tag-der-Sprachen-26-September-_arid,1058948.html

22. September 2017

rtbf - Hörfunk und Fernsehen der französischen Gemeinschaft Belgiens

Un club pour apprendre l'espéranto à La Calamine

Ein französischsprachiger Bericht über 100 Jahre und ein Esperantotreffen über die Grenzen hinweg in Kelmis

https://www.rtbf.be/info/regions/liege/detail_un-club-pour-apprendre-l-espéranto-a-la-calamine?id=9716050

15. September 2017

Frankfurter Rundschau

Wissen

„Für Esperanto gibt es leider keine Lobby“ – „Sprache eines Hoffenden“ – „Mit dem Wörterbuch an der Wiege“

Eine Kopie des Textes zum persönlichen Gebrauch sende ich auf Wunsch gerne per Netzpost zu: „medienecho@esperanto.de“, Betreff: „Frankfurter Rundschau 2017_09_15“

14. September 2017

HarzKurier

Junger Texaner ist zu Gast in Herzberg

Herzberg - Kyle Baker wollte die Esperanto-Stadt kennenlernen.

Der Amerikaner Kyle Baker ist nach Herzberg gekommen, um die Esperanto-Stadt kennenzulernen. Von Beruf ist er Programmierer und IT-Spezialist. Er hatte Esperanto in Internetkursen für Englischsprachige studiert und spricht diese neutrale Sprache besonders gern und gut.

Eine Kopie des Textes zum persönlichen Gebrauch sende ich auf Wunsch gerne per Netzpost zu: „medienecho@esperanto.de“, Betreff: „2017_09_14_harzkurier“

<http://www.harzkurier.de/lokales/herzberg/article211923141/Junger-Texaner-ist-zu-Gast-in-Herzberg.html>

13. September 2017

Herzberg am Harz

Junger Gast aus Texas in Herzberg

Der Amerikaner Kyle Baker erschien plötzlich in Herzberg, um Herzberg als Esperantostadt zu erfahren. Kyle berichtete, dass momentan in den USA viele neue Esperanto-Klubs gegründet würden.

<http://www.herzberg.de/magazin/artikel.php?artikel=3991&type=2&menuid=377&topmenu=7>

6. September 2017

HarzKurier

Sonderausstellung über Dr. L.L. Zamenhof

Herzberg - Seit April wurde auf der oberen Plattform im Schlossmuseum die Sonderausstellung „Dr. L.L. Zamenhof“ gezeigt. Das hundertste Todesjahr des Esperanto-Erfinders wird von der UNESCO besonders gewürdigt. In der Ausstellung sind seltene Stücke aus der Frühzeit des Esperanto zu besichtigen.

Eine Kopie des Textes zum persönlichen Gebrauch sende ich auf Wunsch gerne per Netzpost zu: „medienecho@esperanto.de“, Betreff: „2017_09_06_harzkurier“

<http://www.harzkurier.de/lokales/herzberg/article211839395/Sonderausstellung-ueber-Dr-L-L-Zamenhof.html>

5. September 2017

SWR 1

Esperanto in fünf Kurzkursen von Thomas Bormann

Jeweils samstags am Vormittag. In dem Kurs brachte GEA-Mitglied Thomas Bormann dem SWR1-Moderator Thomas in unterhaltsamer Weise die Grundzüge des Esperanto bei. Jede einzelne Lektion dauerte drei bis vier Minuten und erreichte mehrere hunderttausend Hörer

<https://www.swr.de/swr1/bw/thomas-bormann-in-schmidts-samstag-esperanto-kurso-1/-/lid=233362/did=20037596/nid=233362/12hjj3k/index.html>

28. Juli 2017

HarzKurier

Junge Kubanerin Ariadna war zu Gast in Esperanto-Urbo

Herzberg - An den Sommersprachkursen des Esperanto-Zentrums in Herzberg nahmen auch viele internationale Gäste teil.

Eine Kopie des Textes zum persönlichen Gebrauch sende ich auf Wunsch gerne per Netzpost zu: „medienecho@esperanto.de“, Betreff: „2017_07_28_harzkurier“

<http://www.harzkurier.de/lokales/herzberg/article211396997/Junge-Kubanerin-Ariadna-war-zu-Gast-in-Esperanto-Urbo.html>

22. April 2017

Esperantlingva filmo:

Filmo: *Intervjueto kun Chuck Smith mallonge antaŭ la lanĉo de amikumio*

Registrita en Berlino dum la omaĝo al Ludoviko Zamenhof.

Retpaĝo: http://www.bps1025.com/video/?f_id=channels.htm&n=Esperanto+in+Deutschland+%7C+Deutscher+Esperanto-Bund+e.V.&cid=UC1b8hHguJqSicvd_JY1WrMw



Das Land, wo die Zitronen blühen: San Marino

Poetoj estas ĉiam iomaj profetoj. Neniu scias, kial J.W.Goethe pensis pri San Marino, kiam li skribis tiun linion en sia fama poemo. Eble li antaŭvidis, ke iam okazos tie la Itala Esperanto-Kongreso, kaj li volis helpi la LKK-on alvoki partoprenantojn.

Ĉiuokaze estas multaj kialoj por partopreni la venontan italan kongreson en Sanmarino de la 18-a ĝis la 25-a de aŭgusto 2018, <http://kongreso.esperanto.it/85/>.

Unue Sanmarino [tiel oni regule skribu en Esperanto] mem. Vi eble ne scias, ke la tuta Sanmarino estas heredaĵo de la homaro laŭ Unesko. Laŭ legendo Sanmarino estis fondita la 3-an de septembro 301 de Marino, jugoslava ŝtonhakisto, kiu forlasis sian familion por vivi kiel kristana ermito sur monto Titano. Ĉar Sanmarino en tiu tempo ne havis regantojn, ĝi nomas sin la plej malnova respubliko de la mondo. Ĝia oficiala kalendaro nombras la jarojn de la ŝtatfondo. Post Marino



aliaj kristanoj rifuĝis sur la monton por trovi protekton de la persekuto de la imperiestro Diokleciano. Post la edikto de tolero kaj la laŭleĝigo de kristanismo la monto Titano estis donacita al Marino kaj al liaj kunuloj. Kiam Marino mortis en 366, li onidire deklaris sian komunumon „libera de la rego de aliaj homoj“. Sur tiu diro la komunumo fondis sian sendependecon.

La plej nova skriba leĝo de Sanmarino estas el la jaro 1295. En 1243 oni enkondukis ŝtatestran duopon, la „regantajn kapitanojn“, kiuj oficas dum ses monatoj. Tiu tradicio estas aktiva ĝis nun.

Malgranda kaj malforta, tamen Sanmarino sukcesis NE esti konkerata de Napoleono kaj NE esti konkerata de Italujo dum la procedo de unuiĝo de Italujo, kvankam Garibaldi ricevis la honoran civitanecan. Ĝia plej forta valoro estas la libereco.

